Nacia Centra Biblioteko de Florenco

La **Nacia Centra Biblioteko de Florenco** (itallingve *Biblioteca Nazionale Centrale di Firenze*), aŭ **BNCF**, estas unu el la du naciaj bibliotekoj de Italio. Ĝi troviĝas en Florenco, ĉe la *Piazza dei Cavalleggeri*, dum la alia nacia biblioteko situas en Romo.

La ĉefa fasado, vidita el la rivero Arno.

Kolekto

La origina libraro devenas de la persona kolekto de Antonio Magliabechi, kiu heredigis pli ol 30 000 librojn al Florenco en 1714.

La kolekto sekve pligrandiĝis danke al la grand-duko Francisko la 2-a de Toskano, kiu decidis konservi tie ĉiun libron eldonitan en Toskano ekde 1743.

Siglo de la BNCF.

Historio

La biblioteko oficiale malfermis al la publiko en 1747. Ĝi ricevis multajn donacojn, precipe el monaĥinejoj. La biblioteko fariĝis *nacia* en 1861, kaj *centra* en 1885.

En 1966, ĝi spertis katastrofajn difektojn pro inundoj. Centoj da miloj da libroj estis detruitaj aŭ difektitaj, kaj eĉ malaperis la fotografaj arkivoj. Laŭ UNESKO, "*pli ol du milionoj da maloftaj kaj neanstataŭigeblaj libroj, kaj sennombraj manuskriptoj estis serioze difektitaj*".

Eksteraj ligiloj

- **(it)** Oficiala retejo (http://www.bncf.firenze.sbn.it/)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Nacia_Centra_Biblioteko_de_Florenco&oldid=6803201"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 19:31, 6 dec. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.